




Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2007 numero 1-a: januaro-marto



Laŭ foto aperinta en L'Impartial.

## **Martine Schneller, la bibliotekistino de CDELI, ortografia ĉampiono.**

Ni gratulas Martine Schneller, kiu ĉijare fariĝis **Ĉampiono pri la franca ortografio por Svislando**. Sekve ŝi estis invitita al Kanado por la **Dictée des Amériques** kaj al Afriko por la **Dictée de la Francophonie** (ambaŭ ĉi-printempe).

Al Kanado ŝi jam iris. La konkurso tie okazis la 17-an de marto, **kaj ŝi revenis Svislanden kun la bronza medalo**. Al Afriko ŝi ne povos iri kaj lasis sian vicon al sia tre ĝoja posteulo.

Al la ĵurnalisto, kiu intervjuis ŝin por *L'Impartial* kaj *L'Express*, Martine Schneller interalie menciis, ke esperanto povas helpi koncerne al ortografio en la franca.

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, Poŝtfako 3034,  
CDELI, Biblioteko de la Urbo  
2303 La Chaux-de-Fonds.  
Retpoŝto : [claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch)  
Tel. : ĉe CDELI : 032 967 68 42  
hejme: 032 926 52 32

### Kunredaktoroj :

#### Vivo de SES

Stefano Keller, sekretario de SES

#### Kulturaj paĝoj

Richard Schneller, Höhenstrasse 1 b,  
9302 Kronbühl.

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj

2007-2: aprilo-junio:

maje 25.

2007-3 : julio-septembro :

julie 15.

2007-4: oktobro-decembro:

oktobre 15.

2008-1: januaro-marto:

januare 15.

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.esperan.to/ses](http://www.esperan.to/ses)

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,  
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :  
032 932 18 88.

Retpoŝto : [mireille-grosjean@rpn.ch](mailto:mireille-grosjean@rpn.ch)

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF  
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.

Retpoŝto: [info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,  
1002 Lausanne. Tel.: 079 612 75 79.

Retpoŝto: [stefano.keller@kontakto.info](mailto:stefano.keller@kontakto.info)

Hans-Werner Grossmann, kasisto,  
Esperanto-Servo, PF 262, 4132  
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 89 92.

Retpoŝto: [esperanto-servo@bluewin.ch](mailto:esperanto-servo@bluewin.ch)

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-  
Fonds

## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

# Vivo de SES

2007-1 Stefano Keller

- 1. Jarraporto pri la jaro 2006**
- 2. Bilanco - Jarkalkulo - Buĝeto**
- 3. Raporto de la kaskontrolantoj por la jaro 2006**
- 4. Donacoj ricevitaj en februaro 2007**
- 5. Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo  
sabate, la 28an de aprilo 2007**
  - 5.1. Invito**
  - 5.2. Tagordo**



## **1. Jarraporto pri la jaro 2006**

La jaro 2006 estis certe la jaro de la eldono de la enciklopedio, kaj la jaro de nia partopreno en Comptoir Suisse en Lausanne. Plie la jaro, dum kiu komenciĝis la ekzisto de du kun-prezidantoj. Tamen ni raportu laŭpaŝe.

### **Membraro.**

SES nombras 153 membroj je la fino de la jaro. Malaperis 31 membroj pro malaliĝo aŭ morto. Ni menciuj la mortintojn : Heidi Baur-Sallenbach, Franz Brügger, Margrit Guldin, Elsbeth Walder, André Sandoz, urbestro de La Chaux-de-Fonds kaj fervora subtenanto de esperanto kaj de Gastejo Edmond Privat, Jacques Dovat, edzo de Lucienne, kaj Yvon Grosjean, edzo de Mireille. 13 novaj membroj aliĝis. Ni bonvenigas ilin.

### **Aktivecoj.**

Tri ekzempleroj de la enciklopedio pri planlingvoj en Svislando, verkita de Andreas Kuenzli, estis videblaj dum la someraj kongresoj. Poste estis multaj prokrastoj pro teknikaj kialoj. Fine la libroj alvenis al CDELI la 27an de decembro. Belega dikega libro nepre havenda por ĉiu svisa esperantisto kaj bonega donaco al nesvisa esperantisto. La apero de la enciklopedio kongruas kun la 50-jara jubileo de CDELI.

Laŭ propono de Stefano Keller, ni povis aliĝi al ekspozicio pri daŭrigebla evoluo ene de la granda tutsvisa foiro « Comptoir Suisse ». Ni povis disdoni flugfoliojn kaj paroli pri esperanto al dekoj da vizitantoj. Giganta laboro ankaŭ, sed valora. Stefano deĵoris dum la tuta tempo, aliaj geesperantistoj helpis lin. Ĉiuj estu ĉi tie dankataj !!

La sesan de majo okazis ĝenerala kunveno de SES en La Chaux-de-Fonds kaj 50-jara jubileo de CDELI.

Sub la aŭspicio de Svisa ILEI Sekcio, studsabatoj okazadas en CDELI ĉiun trian sabaton de la monato. Ili estas plej bona okazo por lerni la lingvon kaj/aŭ progresi. Ili okazis la 21an de januaro, 18an de februaro, la 18an de marto, la 20an de majo, la 17an de junio, la 21an de oktobro, la 18an de novembro. Fidele kunvenas proksimume dudeko da gesamideanoj.

Same okazadis la kulturaj seminarioj en CDELI en La Chaux-de-Fonds la 4an de februaro, la 4an de marto, la unuan de aprilo, la 7an de oktobro, la 4an de novembro, la 2an de decembro. Vi konstatas, ke tiuj kunvenoj okazas ĉiam la unuan sabaton de la monato.

Plie lokaj grupoj aktive kunvenadas kaj havas sian propran vivon ie kaj tie en Svislando. Por scii pri tio, kaze ke vi vojaĝadas en nia landeto, vidu nian organon « SES informas ».

### **Informado**

Mireille Grosjean daŭrigas sian laboron ene de Romandio. Paralele, Dietrich Weidmann agadas en Germanio. La plej efika kaj grandskala informado estis nia partopreno en „Comptoir Suisse“. La informado devas esti la tasko de ĉiu, ĉiu membro povas informi ĉirkaŭ si en adekvata formo.

### **Financoj**

Nia kara kasisto buĝetis plielspezojn en la alteco de 6'350.- CHF. Tamen la fina rezulto montras plielspezojn de 4'155.85 CHF. Ni elkore dankas al li pro lia elstara laboro.

### **Organo**

Nia organo « SES informas » aperis kvarfoje dum la jaro kun valoraj informoj ne nur pri la vivo de la societo, sed ankaŭ kun kultura enhavo. Ni elkore dankas al la redaktoro Claude Gacond.

### **Universala Esperanto Asocio (UEA)**

SES estas landa sekcio de UEA. La ligoj estas nuntempe multe pli fortaj ol antaŭe pro la uzo de Interreto. Mireille Grosjean reprezentas SES-n en la komitato de UEA.

### **Nova labordivido ene de la komitato kun du kunprezidantoj**

Ekde la Ĝenerala Kunveno de majo 2006, Mireille Grosjean kaj Dietrich Weidmann estas la du kunprezidantoj de nia asocio. La laboro funkcias glate kaj la farmaniero aspektas tute bona. La komitato kunvenis 2 foje en hotelo en Bielo, urbo atingebla por ĉiuj ene de horo proksimume. La du kunprezidantoj agadis nome de SES en kunlaboro kun Claude Gacond nome de CDELI por finprodukti la enciklopedion, kiun eldonas SES kaj CDELI kune.

Mireille Grosjean kaj Dietrich Weidmann

## 2. Bilanco - Jarkalkulo - Buĝeto

		Bilanco	
N-ro	Konto	01.01.2006	31.12.2006
1010	Poŝtkonto	2'016.59	1'356.97
1011	Fiksa poŝtdepono	7'000.00	7'000.00
1030	WIR banko	36'334.10	33'627.30
1060	Prunto al KCE	15'000.00	15'000.00
1090	UEA konto sesa-v (jarfine: € 174.14)	510.18	274.58
1100	Inventaro	1.00	1.00
1150	Antaŭimposta bonhavo	237.78	158.95
1300	Transaj aktivoj	375.00	375.00
	<b>Sumo aktivoj</b>	<b>61'474.65</b>	<b>57'793.80</b>
2000	Transaj pasivoj	1'235.00	1'710.00
2100	Kapitalo (jarfine: 56'383.85 – 4'155.85)	56'386.85	52'231.00
2400	Agado 2003/05 (rezervita kapitalo)	3'852.80	3'852.80
	<b>Sumo pasivoj</b>	<b>61474.65</b>	<b>57'793.80</b>

		Jarkalkulo	Buĝeto	
		2006	2006	2007
3000	Informado, varbado	2'802.35	3'500.00	4'000.00
3001	Kontribuo al presado de la Svisa Enciklopedio		5'000.00	5'000.00
3002	Comptoir Suisse 2006	3'250.00		
3010	Omagoj, laborrimedoj	80.75	200.00	200.00
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	1'540.00	2'000.00	2'000.00
3110	SES informas elspezoj	2'340.30	2'500.00	2'500.00
3120	Kunvenoj kaj kunsidoj (GK, estraraj, regionaj)	657.20	700.00	700.00
3150	Abono al revuoj	150.00	150.00	150.00
3200	Kotizoj al UEA, EEU, ktp.	235.60	300.00	250.00
3210	Administrado (afrankoj, telefonoj, ktp)	647.90	800.00	700.00
3220	Bank- kaj poŝtspezoj	171.05	150.00	200.00
3230	Donaco al KCE	450.00	450.00	450.00
3500	Diversaĵo		300.00	300.00
	<b>Sumo elspezoj</b>	<b>12'325.15</b>	<b>16'050.00</b>	<b>16'450.00</b>
4200	Membrokotizoj	4'935.00	5'500.00	5'000.00
4210	Abonoj al SESi sen membreco	675.00	800.00	700.00
4300	Donacoj, heredaĵoj	1'564.15	2'500.00	1'500.00
4600	Bank- kaj poŝtinterozo	995.15	900.00	900.00
	<b>Sumo enpezoj</b>	<b>8'169.30</b>	<b>9'700.00</b>	<b>8'100.00</b>
	<b>Plielspezoj</b>	<b>4'155.85</b>	<b>6'350.00</b>	<b>8'350.00</b>

### **3. Raporto de la kaskontrolantoj por la jaro 2006**

Ni, subskribintoj, Dieter Rooke kaj Christiane Sixtus, kunvenis kun la kasisto Hans Grossmann la 17an de februaro 2007 en Bern por kontroli la librotenanadon.

La saldoj de la jaro 2005 estas ĝuste transskribitaj, la kontrolitaj ciferoj kongruas kun la pruviloj, same la saldoj fine de 2006.

Ni konstatis, ke la konto "Agado 2003" (kun CHF 690.00 de la konto Agado 2005) montras saldon de 3'852.80. Daŭre Claude Gacond promesas fari finkalkulon pri ĝi, sed daŭre nia kasisto povas nur atendi. Ŝajnas al ni ke nur en Esperantio oni toleras tian prokraston.

En la buĝeto 2003 troviĝis investo de CHF 5'000 por redaktado de perkoresponda kurso germanlingve. Fakte elspeziĝis en 2003 CHF 2'500 por la enkomputiligo de la malnova kurso. Ni konstatis, ke tiu projekto stagnas kaj eĉ ke la estraro neniom buĝetis por ĝi por la jaro 2006 kaj 2007. Verŝajne tiu projekto ne havos sekvon, do la CHF 2'500 estas perditaj.

Ni kore dankas nian kasiston Hans Grossmann pro la tre zorge farita librotenado kiu ne estas tiom facila. Ni proponas al la Ĝenerala Jarkunveno aprobi ĝin (kun plielspezoj de CHF 4'155.85), la bilancon 2006 kaj malŝargi la kasiston kaj la estraron.

Bern, la 27an de februaro 2007

Kaskontrolantoj:

Christiane Sixtus kaj Dieter Rooke

### **4. Donacoj ricevitaj en februaro 2007**

*Nome de SES, Hans-Werner Grossmann, kasisto dankas jenajn donacintojn pro ties malavara subteno al nia societo:*

Guido Apius, Basel (18); Andreas Bickel, Genève (20); Sonja Brun, Rotkreuz (19); Nancy Fontannaz, Pully (20); Stanislaw Pochanke, Wil (9); Konrad Rey, Luzern (89); Paul Scherer, Emmenbrücke (4).

*Sumo ricevita en februaro 2007: 179.- svisaj frankoj.*

## **5. Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo sabate, la 28an de aprilo 2007**

### **5.1 Invito**


**Loko: Ĝenevo**

Maison des Associations

Rue des Savoises 15

Tramoj 13 aŭ 15 antaŭ la stacidomo (direkto Palettes)  
tria haltejo (Place du Cirque) (vidu mapon)

Manĝo en restoracio Allègre, sandome



**Horaro:**

**Dum la tuta tago : libro-brokantado**

10.30 Malfermo, akcepto

11.00 SES Ĝenerala Kunveno

12.30 Manĝo (plado Fr 15, menuo Fr 20)

14.30 Prelego de Claude Piron : "Sociorigina afazio"

16.00 Parto malfermita al publiko

Koruso esperantista

17.30 Programfino


Sekvas amika kunrestado kaj lasta rigardo al librobrokantaĵoj

### **5.2 Tagordo de la Ĝenerala Kunveno de SES**

1. Salutado, kontrolo de ĉeestantoj kaj senkulpiĝoj
2. Evoluo de la membraro
3. Akcepto de la protokolo de la ĝenerala kunveno 2006
4. Vivo de la societo : akcepto de la estrarraporto
5. Financoj. Prezento kaj akcepto
6. Konsisto de la Komitato. Demisio de Sinjoro Bruno Graf
7. Projektoj por 2007 kaj 2008
8. Buĝeto 2007
9. Diversaĵoj

**Proponoj** devas atingi Mireille Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets aŭ rete mireille.grosjean@rpn.ch ĝis la 20a de aprilo 2007. Proponoj devas esti subtenataj de minimume tri personoj.





# Loka vivo

## Basel

**Esperanto-Societo Basel**

PF 103, 4005 Basel

Tel.: 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

### Venontaj kunvenoj

**Aprile 26** : Temo: Agavoj.

**Maje 25** : Ĉe Berthe Spalinger.

**Junie 28** : Grün.

**Julie 12** : Krad-rostado ĉe H.-P. Senn.

-oOo-

## Genève

**Esperanto-Grupo „La Stelo“**

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy.

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45.

Monata kunveno la unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) 20h00 en la stacidomo de Cornavin, kajo 1, Salono 2.

### Venontaj kunvenoj

**Maje 1** : Temo : La prepozicioj.

**Junie 5** : Temo decidota.

### Raporto

**Kunvenoj**: En 2006 okazis 10 monataj kunvenoj kaj 2 someraj renkontiĝoj,

unu en la parko La Grange kaj unu kun pikniko en la botanika ĝardeno. La zamenhofa festo disvolviĝis en Etoy kun la laŭzananoj.

**Kursoj** : En la Popola Universitato okazis tri divers-nivelaj esperanto-kursoj, kaj kun Claude Piron regule renkontiĝas konversacia grupo kaj kun Christiane Sixtus komencantoj kun la celo kompreni kaj paroli esperanton.

La bulteno *Brasikfolio* aperis 10-foje.

La komitatanoj kunvenis 11-foje.

(Laŭ *Brasikfolio* 2007-3 marto.)

-oOo-

## Lausanne

**Laŭzana Esperanto-Societo**

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 076 411 14 55

[esperanto@isuisse.com](mailto:esperanto@isuisse.com)

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

### Venontaj kunvenoj

**Maje 07** : Kunveno.

**Junie 24-25** : Enĉaleda semajnfino.

### Prezidanta raporto

« Dum la jaro 2006 ĉio funkciis glite kaj glate, laŭ mia gusto eble iomete tro



glate ! » skribas *Dominique de Mestral* enkonduke al sia prezidanta raporto iom pesimisma. Kaj ĝuste lia malkontenteco objektive prezentas la ĝeneralan situacion, kiu propras al la grupa vivo, ĉar ĝi kunvenigas lingve heterogenan membraron. Sed ni plue citu lin kun la espero, ke li restos tamen entuziasma prezidanto de la laŭzana grupo por la sekvaj jaroj.

*Claude Gacond*

« Ni organizis diversajn pli-malpli interesajn kaj amuzajn kunvenojn, ekskursojn kaj babilrondojn. Okazis diversaj ludvesperoj, prilingvaj kunvenoj, eĉ turisma prelego. Pli precize, aprile, Claude Gacond afable kaj brile prelegis pri “iĝ kaj ig” antaŭ malmultaj duondormemaj ĉeestantoj. Junie okazis agrable amikema, frandema enĉaleda semajnfino, dum kiu ni ofte krokodilis kaj do ne vere multe lernis. Decembre tridek personoj el Ĝenevo kaj Laŭzano partoprenis nian zamenhofan feston en Etoy. Kompreneble ankaŭ tiam ni foje gaje krokodilis sed tamen ĝuis belan feston, pri kiu aperis artikolo en “24 Heures”.

Dume nia informilo iĝis pli kaj pli kuirarta gazeto, ĉar ŝajne preskaŭ nur Elisabeth konsentis skibi. Nu, laste kaj balaste, eĉ la komitato ĉiam krokodilas dum siaj kunvenoj.

Nu, la problemo estas, ke nur malmultaj, eble neniu el ni, vere kapablas libere, flue kaj senerare esprimi sin en esperanto. Ŝajnas, ke esperanto ne estas tiom facila lingvo. Ĝi certe estas malpli malfacila lingvo, ol la plej multaj aliaj lingvoj, sed tamen ĝia regado nepre postulas regulan laboron, studadon, legadon, uzadon kaj pensadon... Do, por ke ni ĉiuj progresu, endas laŭ mi

organizi, eble malpli ofte, pli riĉajn, pli altnivelajn, pli lernigajn kunvenojn. Sed por ebligi tion, pli da homoj devus partopreni en niaj kunvenoj kaj ne nur partopreni, sed jam antaŭe prepari sin aktive: legi artikolojn aŭ librojn, pripensi temojn, skribi demandojn ktp. Ekzemple, se ni invitos Claude Piron por prelegi pri sia libro “La bona lingvo”, nepras, ke almenaŭ partoprenu dekkvin personoj, kiuj ĵus antaŭe legis aŭ relegis tiun ĉi libron kaj preparis almenaŭ kelkajn trafajn demandojn. Mi do petas, cerbumu iomete pri tio.

*Dominique de Mestral* »

*Eblo progresigi grupanojn ekzistas : Ĝi konsistas el la organizo de kuna irado al la studsabatoj regule organizataj de CDELI la trian sabaton de la monato. Tiam la ekzisto de trinivelaj studrondoj donas al ĉiu la eblon reale progresi en la praktikado de esperanto.*

*Kaj la kultura seminario okazanta la unuan sabaton de la monato ebligas intimiĝi kun la kulturaj karakterizaĵoj propraj al esperanto.*

*En la grupoj kuna legado de teatraĵeto aŭ arta novelo cele al ties dirado okaze de renkonto, povas esti ege lerniga aktiveco vekanta bonhumoron kaj entuziasmon. Kiuj aktoraj prezenti skeĉon, tiuj samtempe atingis realan parolan kapabon.*

*En la retejo [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch) troveblas multaj radio-prelegoj, kiuj konservis sian aktual-econ. Temas pri dialogoj facile legeblaj. Kial ne ekzerciĝi ilin duope laŭlege prezenti al la aliaj grupanoj enkonduke al diskuto !*

*Claude Gacond*

-oOo-

# Luzern

## Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj:

Restoracio Emmenbaum: Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke.

Restoracio „bellini“ (hotelo Continental-Park) Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe Ges-roj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel.: 041 210 25 88.

## Venontaj kunvenoj

**Aprile 11** : Ĉe Rey : 14h00 : Paroliga leciono. 14h30: De Hillel al Homarismo, kun Sonja Brun.

**Maje 09** : Ĉe Bellini : 14h00-16h00 : Konversacia rondo, kun Paul Scherer.

**Junie 13** : Ĉe Rey: 14h00 : Paroliga leciono, kun Paul Scherer. 14h30 : La historio kaj frabrikado de ĉokolado, kun Annelies Dettling.

**Julie 11** : Ĉe Bellini : 14h00-16h00 : Konversacia rondo, kun Sonja Brun.

**Aŭguste 10** : Ekskurso vespera (Programo anoncota).

**Septembre 12** : Ĉe Bellini : 14h00-16h00 : Konversacia rondo, kun Paul Scherer.

**Oktobre 10** : Ĉe Rey : 14h00 : Paroliga leciono, kun Paul Scherer. 14h30 : Pensiulino parolas pri aktiva 3-a aĝo, kun Margrit Scherer.

**Novembre 14** : Ĉe Bellini : 14h00-16h00 : Konversacia rondo, kun Sonja Brun.

**Decembre 12** : Ĉe Rey : 14h00: Paroliga leciono. 14h30 : Zamenhofologio kaj Programo 2007, kun Paul Scherer.

**2008 Januare 09** : Ĉe Bellini. 14h00-16h00 : Konversacia rondo, kun Sonja Brun.

-oOo-

# Wil

## Esperanto-Klubo Wil

[www.esperanto.ch/wil](http://www.esperanto.ch/wil)

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel.: 071 393 41 49. [chaves-walder@bluewin.ch](mailto:chaves-walder@bluewin.ch) kaj Wolfram Fischer. Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel.: (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax: 071.390.04.47

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19 h 00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse 1 (apud la suda elirejo de la fervoja stacidomo).

-oOo-

# Zürich

## Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld.

Tel.: 044 251 50 25

[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch) reto:

[www.esperanto.ch/zuriko](http://www.esperanto.ch/zuriko)

**Regula merkreda programo** : krom dum la ferioj : 18.00–18.45 : kurso por komencantoj. 19.00–19.45 : konversacia rondo. (bonvolu telefone aliĝi dum la oficeja horaro ĝis la tago antaŭa : 044 251 50 25 aŭ retroŝte : [info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)).

## Esperanto-kursoj

ESZ ofertas regule privatajn lecionojn por 1-3 personoj por ĉiuj niveloj kaj semajnfinajn kursojn en feridomo en Alt Sankt Johann. Informojn petu de Nelida Weidmann. Telefone : 044 251 50 25 aŭ rete : [kursoj@esperanto.ch](mailto:kursoj@esperanto.ch)

## Programo de ESZ

La programo de ESZ troveblas sub:

<http://www.esperanto.ch/zuriko/programo.html>

-oOo-

# Tutsvisa aktiveco

## CDELI

Centre de documentation et d'étude sur la  
langue internationale

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la  
Lingvo Internacia

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33  
Case Postale 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds  
Tel. : 032 967 68 42.

Retadresoĵ :

[claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch)

[martine.schneller@ne.ch](mailto:martine.schneller@ne.ch)

[nancy.fontannaz@ne.ch](mailto:nancy.fontannaz@ne.ch)

[monika.molnar@ne.ch](mailto:monika.molnar@ne.ch)

### Venontaj stud-aranĝoj !

**Didaktika stud-sabato** okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Rezervu la sekvajn sabatojn : **junie 16, septembre 9, novembre 17.**

**Kultura sabata seminario** okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **maje 5, junie 2, septembre 1, oktobre 6, novembre 3, decembre 1.** La celo de tiu seminario, kiu disvolviĝas sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA, ne estas la studo mem de la lingvo, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Partoprenintoj al 15 tiaj sabatoj estos rekompencitaj per ricevo de atestilo.

**Venontaj studtemoj** : La disvolviĝo de esperanto ekde 1894 ĝis 1910. Konatiĝo kun la ĉefaj verkistoj de tiu pionira epoko.

Instruas Claude Gacond aŭ invititaj fakuloj.

**La 1-an de septembro nia invito Reinhard Haupenthal prelegos pri la vivo, verkaro kaj agado de Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük.**

**Nepre partoprenu tiun sabaton !**

### Horaro de ambaŭ aranĝoj

10 h 00: Malfermo, eblo aĉeti librojn, babilo kaj kafumi.

**10 h 35 : Oficiala malfermo**, formiĝo de la stud-rondoj. **10 h 45 : Studo.** 11 h 30 : paŭzo. **11 h 45 : Studo.** 12 h 30 : Tagmanĝo. **14 h 15 : Studo.** 15 h 00 : paŭzo. **15 h 15 : Studo.** **16 h 00 : Konkludo.** 16 h 15 : Teumo, librovendo. **17 h 00 : Oficiala fermo.**

**Aliĝo** : Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminaĵaj sabatoj ĉiu **bonvolu nepre antaŭ-anonci sian partoprenon almenaŭ ĝis la vendredo antaŭ la koncerna aranĝo je la 11h00** ĉu skribe al Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: [claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch),

ĉu telefone : CDELI: 032 967 68 42.

**Partoprenkotizo** : Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario. (Lerneĵano, studento, metilernanto kaj JES-ano senpage). Kiu ne antaŭanoncis sian partoprenon ĝis 11h00 la antaŭan vendredon, tiu pagas pluse Fr 5.-.

-oOo-

# Pri la aktiveco de CDELI en 2006

La laboro de la bonvolaj kunlaborantoj de CDELI, kiuj konsistas el Claude kaj Andrée Gacond kaj Monika Molnar el La Chaux-de-Fonds, Nancy Fontannaz el Pully kaj Stéphane Keller el Lausanne, estas organizita por ke la bibliotekistino Martine Schneller laboranta triontempe povu dediĉi la maksimumon de sia tempo al la katalogada laboro en RERO. Nun ĉirkaŭ 4000 noticoj CDELI troviĝas en RERO, inter kiuj 594 kreitaj en 2006.

La bonvolula laboro estas tiel disdonita: Claude Gacond okupiĝas pri la kontaktoj kun la esploristoj, eldonistoj kaj donacemuloj, pri la gvidado de la bonvoluloj, organizo de la kursoj kaj seminarioj, pri la ordigo de la libroj katalogitaj kaj konsultitaj, pri la redakta kaj administra laboro. Andrée Gacond registras la periodaĵojn. Monika Molnar registras arkivaĵojn per la sistemo Archibase uzata de la biblioteko kaj adaptita al CDELI. Nancy Fontannaz okupiĝas pri la libro-servo kaj pri la kontaktoj kun la esperanto-studentoj, Stéphane Keller zorgas pri informatiko, interalie pri la retejo [www.esperantogacond.ch](http://www.esperantogacond.ch), kiu konigas la kolektojn de CDELI. En 2006 li organizis la registradon de la periodaĵoj, kies kolektoj tiel komencas esti rete konsulteblaj.

Koncerne al la laboro de la bibliotekistino Martine Schneller ni menciuj, ke en 2006 konkludiĝis la katalogado de la donaco Paul Bouvier (500 titoloj sub la signo Li PB), kiu estis la unua esperantisto donacinta sian libraron al CDELI. La interlingvistika dokumentaro de la nederlanda esperantologo W.J.A. Manders, kies heredinto M. Derk Ederveen el Voorburg en Nederlando donacis al CDELI en 2005, daŭre katalogiĝas, same kiel multaj gravaj donacoj ricevitaj en 2005 interalie de Arthur Baur en Zürich, de la heredintoj de Madeleine Stakian en Genève kaj de libraro de Tazio Carlevaro en Bellinzona ricevita en 2006. Inter la aliaj valoraĵoj estas tiu de Elisabeth Burri en Zumikon. Ŝi kompletigis la donacon de 12 akvofortoj de la serio titolita *Kajeno* de la esperantista pentristo Alfred Gloor (1892-

1978), kiun ŝi faris en 2005, donacante la tuton de la aliaj gravuraĵoj kaj akvareloj en sia posedo. Interlie estas menciindaj 85 akvareloj ilustrantaj la verkon *Urax und Rezabell* de Marcel Dornier (Stuttgart: Strecker und Schröder, 1921). Tiu libro, kiun la pentristo komentariis, estas katalogita sub la signo ESP 934.

Laŭ la alfabeto ordo de la landoj ni listigas la donacintojn, kiuj kontribuis al la riĉigo de la kolektoj de CDELI en 2006: Aŭstrio: Gerard Cool en Leiniz; Britio: BEA en Londono; Francio: André Cherpillod en Courgenard kaj Raymond Guegen en Limoges; Germanio: Detlev Blanke en Berlin; Hungario: Gyözö Gaál en Oros; Japanio: Japana Esperanto Libro-Kooperativo en Tokyo; Nederlando: UEA en Rotterdam; Pollando: Tomasz Chmielik en Svidnik; Ruslando: Aleksandr Korjenkov en Kalingrad; Svislando: Tazio Carlevaro en Bellinzona, Armand Cotton en Vandoeuvres, Claude Gacond en La Chaux-de-Fonds, Martine Schneller en Neuchâtel, Kurt Schweizer en Ettingen kaj Jean-Thierry von Büren en Savagnier.

La 6-an de majo, paralele al la inaŭguro de la renovigita biblioteko, okazis en la nova labor-salono de CDELI kaj en la sam-etaĝa aŭlo de la duagrada lernejo, festado de la 50-jara jubileo de la fondo de CDELI. Cento da esperantistoj kaj amikoj de esperanto partoprenis tiun aranĝon. Gelernantoj de la privata lernejo La Grande Ourse prezentis teatraĵon pri la planlingvoj. Jean-Thierry von Büren kun la akompano de la itala pianisto Giuseppe Giusta de Cuneo interpretis fragmentojn de *Winterreise* de Franz Schubert laŭ esperantigo de Mad Mevo. La direktoro Jacques-André Humair enkonduke diris la gravecon de CDELI, Claude Gacond rememorigis la komencon de sia interlingvistika aktiveco kaj Andy Künzli anoncis la baldaŭan aperon de la *Svisa Enciklopedio* redaktita grandparte dank'al la arkivo de CDELI.

En 2006 konkludiĝis kvar-jara laboriga periodo pro la transformado de la biblioteko. Kvarfoje devis esti translokita la materialo de CDELI, kaj ankoraŭ restas multo ne plene reordigita, interalie la brokanta servo pro tio ankoraŭ ne povas funkcii.

-oOo-


Redaktas : Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9302 Kronbühl, rischneller@gmail.com  
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Humphrey Tonkin

## Lingvo kaj popolo

Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado

• Recenzas Andy Künzli



Por la aŭtoro Humphrey Tonkin, kiu estas konsiderata kiel “la plej elstara gvidanto de la Esperanto-movado de la lastaj jardekoj” (dorsa kovrilo), Esperanto signifas lingvan revolucion, sed la metodoj de la Esperanto-movado disvastigi tiun lingvon apenaŭ montriĝas revoluciaj. La artikoloj de la fama brita-usona esperantisto, publikigitaj en la libro *Lingvo kaj Popolo*, kiuj estas la skriba formo de prelegserio, kiu devintus okazi kadre de la post-diploma programo de Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando, mem ne celas esti revoluciaj, sed klarigaj, informaj kaj diskut-instigaj.

Ĉiuj el la ok aparte legindaj ĉapitroj estas dediĉitaj al alia prioritata temo, kaj ĉiu ĉapitro starigas amason da konsideroj, asertoj, tezoj, demandoj kaj meditoj pri pasinteco, aktuala periodo kaj estonteco de la Esperanto-movado, de UEA kaj de la esperantismo. La aŭtoro referencas al propraj kaj fremdaj

artikoloj, kies bibliografion oni trovas fine de la volumeto.

Ĉar en la historio de la Esperanto-movado ĝiaj komunumanoj ofte debatis kaj kverelis pri la adekvataj organizaj formoj kaj ne certis, ĉu ili fondu organizaĵon aŭ prefere agu ekster ajna organiza kadro, Tonkin atentigas en la unua ĉapitro pri *la lingvo kaj ĝia rolo: idearo kaj ideologio*, ke necesas sin demandi pri la dezirinda identeco: ĉu do ni estas – aŭ estu – movado, lingvokomunumo, popolo aŭ civito, diasporo aŭ ĉu (novtipa) kulturo. Do la esperantistanoj socion oni povas koncepti laŭ diversaj manieroj, depende de la valoroj atribuitaj al ĝi, kaj oni povas vidi ĝin tra pli ol unu prismo. Necesas ankaŭ respondi, ĉu oni volas agadi por Esperanto per sciencaj, turismaj, komercaj, kulturaj, (lingvo-)politikaj aŭ aliaj celoj. La motivoj por esperantisteco povas tre vari, same la karaktero de la Esperanto-movado en la plej diversaj landoj. Tonkin firme rifuzas ajnan decidon pri kio Esperanto estas aŭ estu, ĉar laŭ li fakte ĝi estas ĉiuj el tiuj difinoj kaj samtempe neniu. Finfine eblus adopti plurajn difinojn aŭ identecojn, kaj Tonkin ne deziras ekskludi iun vojon eble taŭgan por Esperanto (ĉar ni ankoraŭ ne scias, kio ni vere estas).

La konkludo, ke ju pli efika Esperanto fariĝas, des malpli urĝa estas la bezono disvastigi ĝin, certe estas paradoksa kaj malagrabla vero por la esperantistaro, kiun necesas digesti kaj al kiu oni devas adekvate reagi: ne per unuiĝo en negativa opinio rilate la lingvan problemon en la mondo kaj la eksteran publikon, ĉar la ĉirkaŭanta ekstera socio tiel malestime konsideras nian lingvoprojekton, sed per pozitiva aliro al tiu lingva realeco, eĉ se la usonangla lingvo dominas. Lige kun tiu sakstrata situacio, en kiu la esperantistoj devis kompreni, ke ili ne kapablas ŝanĝi la mondon, la grava movada funkciulo, kiu konscie travivis – kaj en sia libro atentokapte rakontas – la movadan historion almenaŭ ekde 1955, jaro de lia esperantistiĝo, ne hezitas en multaj okazoj lanĉi kritikon al la iama kaj nuna Esperanto-movado, ĉefrepresentata de Universala Esperanto-Asocio, sed samtempe li prezentas ankaŭ vastan proponaron pri kio estus plibonigenda kaj farenda.

Grandan parton de la teksto do koncernas la rolon, taskojn kaj problemojn de Universala Esperanto-Asocio (UEA), la pinta rolulo de la Esperanto-movado. En la dua ĉapitro *pri lingva politiko interna kaj ekstera* Tonkin lamentas pri la malkapablo de la Esperanto-movado kongrui la du sferojn de la interna kaj ekstera politiko. Bedaŭrinde la esperantistoj ne sciis kiel krei atentokaptajn aranĝojn aŭ novaĵojn, kaj ili ankaŭ ne kapablis ekspluati favorajn kondiĉojn (kiel ekzemple la Unesko-rezolucioj de 1954 kaj 1985). Aliflanke ne nur kulpus la esperantistoj mem, sed gravan psikan radiadon havus la “ekstera publiko”, kiu ne nur ne donus sufiĉe seriozan atenton al la Esperanto-projekto, sed

kiu grandparte ignorus ankaŭ la signifon de la “lingva demando” en la mondo. Por rompi sian izolecon, Tonkin rekomendas al UEA alianciĝi kun tiuj, kiuj almenaŭ komprenas la gravecon de la lingva dimensio en internaciaj rilatoj. Por provizi influajn personecojn el scienco, politiko kaj diplomatio en Eŭropa Unio, kies lingvopolitika sistemo laŭ Tonkin bankrotis, servas la Nitobe-simpozio, kiu ĝis nun okazis kvarfoje kaj kiu konvene unuigas la deziratan celpublikon. Sed sine de UEA ekzistus por celtrafa lobiado ankaŭ aliaj taŭgaj rimedoj kiel CED, la revuo LPLP, sed ankaŭ la Universalaj Kongresoj kaj aliaj aranĝoj organizitaj de UEA kaj ties Landaj Asocioj.

Koncerne la neŭtralecon de UEA, Tonkin apartenas al tiuj, kiuj favoras aliancojn kun samtiraj aŭ similcelaj organizaĵoj, eĉ se ili estas neneŭtralaj kiel ekzemple komunistaj. Kiam li gvidis TEJO-n en la 1960-70aj jaroj, okazis grava karambolo, eĉ kontuza batalo kun Ivo Lapenna, kiu aplikis pli kaj pli rigoran neŭtralecon, kiun Tonkin kaj ties kunbatalantoj ne volis akcepti, timante, ke tiu apliko de neŭtraleco malhelpas engaĝiĝi en aferoj, kiuj ne rekte tuŝas la lingvan demandon. Do se temas pri Lapenna, kiun Tonkin ja admiregas kiel efikan funkciulon kun multaj meritoj por la Esperanto-movado, li tamen kritikas lin kiel gvidanton de la malnova skolo, kiu perdis la komprenon por la juna generacio. Lapenna, kiu daŭre estas traktata en la libro, evidente devis resti por Tonkin speco de koŝmaro, de kiu li ŝajne malfacile liberiĝas, ĉar la travivitaj krizoj kun li devis profunde impresi la tiaman junulon, en kiu iuj mem kredis malkovri la novan Lapennan. Akuzita de Lapenna post 1974 kiel “kunvojaĝanto

de komunismo” aŭ kiel “naivulo”, Tonkin do ne hazarde sentas ambivalencon rilate al tiu figurego. Por Tonkin la Praga Manifesto (1996) heredis la spiriton de aktiva neŭtraleco, laŭ kiu UEA ne timu utiligi politikajn fluojn por progresigi proprajn celojn, eĉ se ili estas kontestataj de multaj “neŭtralaj” esperantistoj.

En la tria, teoria ĉapitro pri *kio estas lingvopolitiko?* Tonkin atentigas, ke lingvoplanado ne estas afero nur de registaroj, sed ankaŭ de neregistaraj organizaĵoj. Sekve UEA okupu la adekvatan lokon en tiu diskutado, kondiĉe ke la diversaj difinoj kaj aspektoj de lingvopolitiko kaj lingvoplanado estas korekte aplikataj al Esperanto.

La kvara ĉapitro emfazas la gravecon de *lingvokultivado* kaj atribuas al UEA, kiu sendube estas konservenda, sed ankaŭ reformenda kaj modernigenda, en tio amason da gravaj taskoj. La aŭtoro lamentas, ke lingvokultivado estas traktata de UEA iom hazarde, senplane kaj senstrategie. Kiel gravega influanto rilate la lingvouzon de ĝiaj membroj, parolan kaj skriban, UEA do neniel neglektu la lingvan nivelon de la membroj, sed male, altigu ĝin, mem uzu la lingvon modele kaj krome ankaŭ okupiĝu pri la kultura dimensio de la lingvo. Konsiderante la ofte fuŝan kaj aventuran Esperanto-lingvouzadon kaj -kultivadon de partoprenantoj, precipe leksikan, gramatikan kaj prononcan, dum Universalaj Kongresoj, tiam oni vere povus dubi pri la ĉi-rilataj sukcesoj de UEA. Sed Tonkin konsolas, ke la saman problemon konus ankaŭ etnaj lingvoj, krome preskribi la lingvouzon ne eblas. Se Tonkin kritikis ankaŭ la neadekvatan plenumadon de la prizorgado kaj stimulado de la libro-kulturo en

Esperanto, li trafas alian vundan punkton de la Esperanto-movado.

Kiom grandan signifon havas por Tonkin la *eksteraj rilatoj kun UN kaj Unesko*, eblas konstati en la kvina ĉapitro. La ĉefa celo de la ekstera agado estas gajni statuson kaj influon por Esperanto. UEA establis parte sukcesajn eksterajn rilatojn ĉe UN en Novjorko, Vieno kaj Ĝenevo. Ekde la ekzisto de internaciaj organizoj, en la 1920aj jaroj funkciis Ligo de Nacioj, eminentaj reprezentantoj de la Esperanto-movado prezentis rezoluciproponon por provi atingi agnoskon por Esperanto sur la nivelo de signifaj mondaj organizaĵoj. Post kiam fiaskis la klopodoj en Ĝenevo, ĉefe pro la kontraŭstaro de Francio (influo de nacismo!), legendeca ja fariĝis la rezolucia sukceso ĉe Unesko en Montevideo en 1954, iniciatita de Lapenna. Tamen la “rezolucio sen buĝetaj sekvoj” ne havis gravajn konsekvencojn, nek por Unesko mem, nek por UEA. La rezolucian sukceson de 1985 en Sofio, kie ĉefrolis Tibor Sekelj, Tonkin taksas eĉ pli altvalora, kvankam ĝi ne estus imagebla sen la atingo de 1954. Eksteraj rilatoj estas delikata tereno kaj dependas de multaj faktoroj kaj kapricoj ofte malfacile antaŭvideblaj. Same la sukceso de eksteraj rilatoj dependus ne nur de formala diplomatio, sed ankaŭ de personaj amikecoj kun gravaj funkciuloj, kiuj simpatias al la afero de Esperanto. En la historio de UEA estis kelkaj tiaj kazoj, inter kiuj la epizodo kun M<sup>o</sup> Bow eble estis la plej fama. Kiam la mandato de tiuj homoj finiĝas, ne malofte estas tre malfacile trovi kontinuecon. Nature ankaŭ Tonkin demandas sin, ĝis kiu grado nia aktivado ĉe UN kaj Unesko plu havas ajnan signifon. Tiu signifo certe iom depen-

das ankaŭ de la volo aŭ ne de grandaj ŝtatoj daŭre subteni tiujn mondorganizaĵojn. Kiel konate, kun la ekŝigo de Usono kaj kelkaj aliancitaj landoj el Unesko la signifo de tiu organizo ŝrumpis, sekve ankaŭ la agadoj, kiuj estas ligitaj kun ĝi.

En la sesa ĉapitro pri *nunaj kaj estontaj strukturoj* Tonkin montras sin konvinkita, ke la falo de la komunismo, la enkonduko de la kapitalismo en Orienta Eŭropo kaj la interreto profunde ŝanĝis la mondon kaj postlasis spurojn ankaŭ en UEA. Eĉ post ŝoka malkreskado de la membraro kun sekva rekresko oni ne havu iluzion, ke ĉirilate oni ne troviĝas sur descenda deklivo. Sed tio ne nepre signifas, ke samtempe la nombro de aktivuloj falis. Tamen la renverso de tiu tikla stato povos okazi nur pere de ŝanĝo de niaj metodoj. Antaŭ ol enkonduki iujn ajn strukturajn reformojn sur la ebena de la Komitato, Estraro kaj oficistaro, estas neeviteble, ke UEA unue okupiĝu pri siaj financoj, kaj ankaŭ pri sia Strategia Plano. Tonkin ankaŭ kredas, ke simple ŝanĝi strukturojn verŝajne ne pravigus la originajn intencojn. Precipe la homa faktoro devus esti atentata, kaj la ŝparado de mono por redukti personajn laborajn kontaktojn inter kunlaborantoj estus granda eraro. Krome necesus eviti la rivalecon inter la Centra Oficejo kaj la Estraro kaj forte distingi la rolon kaj taskojn de ambaŭ instancoj. La Estraro ludu sole superrigardan rolon, la Centra Oficejo ricevu la okazon por garantii, krom la administraj, aldonajn servojn sur la eduka kaj kultura kampoj, nelaste favore al la Landaj Asocioj. La malnova konstruaĵo de 1887 en Rotterdamo devus esti renovigita. La Universalan Kongreson oni ne devas malmunti, sed tamen reekzameni ĝiajn

celojn por plenumi tiujn celojn pli bone. Antaŭ ĉio necesus eviti, ke la UK-publiko restu pasivaj konsumantoj, ke la kultura kaj kleriga dimensioj estu pli efike flegataj kaj ke la individuaj kotizoj estus reduktitaj.

Pri ĉefaj trajtoj de *la Esperanto-komunumo en la mondo* oni povas legi en ĉapitro 7. Tie Tonkin spertis la unuopajn esperantistojn kiel individuistoj malfacile regeblaj. Sed esperantistoj estus ankaŭ karakterizataj de forta lingva lojaleco, kiu estas signifa faktoro en la vivo de esperantistoj, kvankam ili kutime libervole elektis Esperanton. Samtempe la esperantistoj estas ligitaj kun iu specifa ideologio, kiun oni povas nomi lingva ideologio. Ŝajnas, ke grandparto de ili lernas Esperanton unuavice pro lingvaj interesoj, ne pro la deziro ŝanĝi la mondon. Kaj ke la averaĝa esperantisto estas – aŭ estis – klubo membro, gazet-abonanto, radio-aŭskultanto, vojaĝanto kaj kolektanto, ni jam scias. Bedaŭrinde, en la epoko de retpoŝto iom perdiĝas la privataj korespondaĵoj, kiuj estus esence grava materialo por esplori kaj analizi la temojn traktitajn fare de ordinara esperantistoj. Kontaktoj en Esperantujo kutime okazas skribe. Nun kelkaj esperantistoj produktas retpaĝarojn, kiuj enhavas amasegon da sciigoj kaj desegnas novan formon de informado. La maniero labori kaj interŝanĝi kontaktojn do profunde ŝanĝiĝis kompare kun la 50aj, 60aj, 70aj jaroj.

La tiklan demandon de la esperantista identeco traktas la fina, oka ĉapitro *esploroj kaj estonteco*. Laŭ Tonkin, kaj aliaj, ne tio estas konvinka, ĉu Esperanto havas aŭ ne havas akuzativon, sed ĉu ĝi havas estontecon. Kvankam diversaj gravaj verkoj pri la trajtoj de la Esperanto-movado jam aperis, ni bezon-



nas pli da soci- kaj psikolingvistikaj, sociologiaj kaj demografiaj studoj pri la Esperanto-komunumo. Ni scias relative malmulte pri la intelekta kunteksto de Esperanto, pri la kialoj de la kulturaj praktikoj de Esperanto, pri kio allogas aŭ forpuŝas homojn rilate Esperanton, kial homo verkas poezion en Esperanto, kial homo entute okupiĝas pri artefarita lingvo. Sendube la intereso pri tiuj temoj kreskas, kaj flanke de esperantistoj, kaj de esploristoj el ekster la Esperanto-medio. Ekzistas pluraj organizoj, kiuj lanĉis kaj financas tiajn sciencajn esplorojn pri la fenomeno Esperanto, kiel Esperantic Studies Foundation (ESF) kun buĝeto de pli ol cent mil dolaroj jare. Same nia historiografio estas kultivinda. Tamen la fakoj esperantologio kaj interlingvistiko restas daŭre marĝenaj. Do estus domaĝe, se ni neglektus niajn bazajn devojn kaj taskojn.

Krom aproboj certe ne mankos ankaŭ kritikaj reagoj kaj kontrastaj priaksoj, kiujn provokos la eldiroj, komentoj kaj tezoj, opinioj kaj vidpunktoj de Tonkin, prezentitaj en *Lingvo kaj Popolo*, flanke de aliaj movadaj aktivuloj. Pro sia drasta subjektiveco la – oratore kaj stile tamen brila – notaro eble klasifikiĝas malpli kiel akademi-eca fakprelego kadre de interlingvistika kurso en universitato, sed ĝi multe pli valoras en la ĝenro de movadologiaj manlibroj por ĉiu, kiu deziras konatiĝi ne nur kun la pensado de unu el la plej elstaraj, spertaj kaj kleraj movadaj aktivuloj, sed ankaŭ por pli bone kompreni bazajn debatojn, diagnozojn, analizojn kaj interpretojn pri la Esperantomovado, kiel ĝi aperigas sin dum jardekoj kaj nuntempe. Do estus bone, se la “plena verkaro” de Humphrey Tonkin povus baldaŭ aperi.

## Enhavo

### Antaŭparolo

1. **La lingvo kaj ĝia rolo: idearo kaj ideologio.** Movado aŭ lingvokomunumo? Neŭtraleco. Nia afero – esperantismo. Tyresö kaj Rauma. Konkludo.
2. **Lingva politiko interna kaj ekstera.** Niaj celoj. Ekstera politiko kaj internaj celoj.
3. **Kio estas lingvopolitiko?** Lingvoplanado. Lingvaj elektoj. Konkludo.
4. **Lingvokultivado.** Institucioj. La praktikantoj. La rolo de UEA. Konservado la historion. Disvastiĝo.
5. **Eksteraj rilatoj: UN kaj Unesko.** La unua stadio. La dua stadio. La tria stadio. La kvara stadio. La sekvoj.
6. **Nunaj kaj estontaj strukturoj.** Sociaj ŝanĝoj. La Komitato de UEA. La taskoj de la Estraro. La homa flanko en la Komitato. La rolo de la Centra Oficejo. La Centra Oficejo kiel eduka kaj kultura centro. Rilatoj Centra Oficejo/Estraro. Mortas la membraraj organizaĵoj; naskiĝas la kampanjoj. Esperanto Internacia. La Universalaj Kongresoj. Kongresaj reformoj.
7. **La Esperanto-komunumo en la mondo.** Identeco kaj ideologio. Praktiki Esperanton. Gazetaro kaj Interreto. Vojaĝi, kolekti, aŭskulti. Informado kaj instruado. Kiom da Esperanto-parolantoj?
8. **Esploroj kaj estonteco.** La paradokso interno/ekstero. La lingvo kaj la komunumo. Strukturoj por esplorado. Esploroj kaj planado. Anstataŭ konkludo.

### Bibliografio

**Aldonaj dokumentoj.** Deklaracio de Tyresö (1969). Manifesto de Raŭmo (1980). Manifesto de Prago (1996). Indekso.

# Ĉu ekzistas lingva ekologio ?

*Dum la renkonto en Laŭzano de la 15a de oktobro 2006 kun prelegoj pri ekologio la aŭtoro prezentis jenan temon tuŝanta lingvistikon kaj biologion.*

• *Alain Favre*

La vorto “ekologio” venas de la grekaj radikoj οἶκος, “restejo, vivejo” kaj λόγος, “parolado”. Laŭ PIV ekologio estas scienco pri la rilatoj de la vivuloj inter si kaj kun sia medio. Efektive la sciencistoj tradicie distingas inter *kun-ekologio* aŭ *sinekologio* (rilatoj inter la vivuloj) kaj *memekologio* aŭ *aŭto-ekologio* (rilatoj de ĉiu vivulo kun sia fizika medio).

Ĉu lingvo estas vivulo? Biologie ne. Lingvo estas sistemo de signoj, kun morfemoj kaj fonemoj. Tamen oni foje diras, ke lingvo naskiĝas, mortas, oni eĉ parolas pri aĝo de lingvoj. Dum sia prelego en la lasta UK en Vilno, Prof. *Jouko Linsteadt* el Helsinko asertis, ke fakte lingvo ne havas aĝon, ĉar ne havas komencon. Ĉiu laŭgrade devenas de iu alia; eĉ esperanto havas font-lingvojn. Tamen tio ŝajnas sufiĉe drasta opinio; ankaŭ lia ekzemplo de la franca lingvo, kiu, generacion post generacio, preskaŭ trankvile distanciĝis de la latina, ne estas tre bone elektita. Fakte la franca estis ege manipulita de oficialaj “gramatikistoj” kaj varianto parolata de tre malmultaj homoj, ĉefe korteganoj, estis pli kaj pli altrudita al la regnanoj, poste eĉ al homoj en aliaj landoj – ni ekzemple ne forgesu, ke la franca ne estas etna lingvo en Svislando.

Ĉiukaze se lingvo ne kompareblas kun vivulo, individuo, ĝi tamen pli similas specion. Kaj eĉ se ĝis nun, male al ies asertoj, malmulton oni scias pri la evoluo de la vivuloj, tamen la supozataj procezoj povus esti pli malpli similaj koncerne lingvojn kaj speciojn. Ekzemple specio/lingvo povas kreiĝi surloke, per laŭgrada aŭ pli verŝajne diversitma evoluo. En iu kazo genoj, en la alia prononcmankoj, vortoj, esprimoj novaj anstataŭas la malnovajn. Kialo povas esti iaspeca “natura derivado”, sed tutcerte rolas ŝanĝiĝoj en la medio : por specio temas ekzemple pri klimataj varioj, por lingvo pri novaj politikaj aŭ produktaj kondiĉoj. Aliokaze bariloj povas aperi kaj disdividi la komunumojn. Por specioj temas interalie pri montaroj, marbrakoj... por lingvoj pri novaj landlimoj. Tiel granda specio, granda lingvo dispeciĝos – en la dua kazo ni pensu pri la latina. Dum sia fama vizito al la Galapagoj, insularo en la orienta Pacifiko, Darwin konstatis, ke la fringoj estas malsamaj en ĉiuj insuloj, kie ili adaptiĝis al la loka medio, eĉ se ili plej probable havis komunan devenon. Same okazas por lingvoj, ekzemple la polineziaj en Pacifiko, aŭ, se resti kun la eŭrop(deven)aj lingvoj, la afrikansa, kiu en kelkaj jardekoj fariĝis nekomprenebla por nederlandano. Ankaŭ la akadia en Nordameriko ne estas komprenebla por la eŭropaj franclingvanoj, kvankam nun la akadianoj disponas lernejojn, en kiuj oni instruas pli “normitan” francan. En tiuj kazoj ne nur disiĝo kaj izoliĝo, sed ankaŭ nova medio efikis.

Ankaŭ influo de lingvoj unu sur la alia povas esti tre forta, ĉefe se la lingvejoj apudas. Ekzemple la rumana, kiu estas latinida, havas multajn vortojn slav- kaj hungar-devenajn. Ĝia artikola sistemo tute similas tiun de la bulgara, kiu apudas sed ne samgrupas. En Nord-ameriko la angla kaj franca posedas komunajn trajtojn, kiuj ne ekzistas en iliaj eŭropaj – aŭ alikontinentaj – variantoj. Same, en natura medio, specioj ofte influas unu la alian, ili eĉ kun-evoluas: tio ekzemple validas pri floroj kaj insektoj aŭ birdoj, kiuj foje “strange” samaspektas. Ankaŭ ekzistas la fenomeno de la “gena transdono” far viruso aŭ bakterio, kiu povas preni genetikan materialon el vivulo kaj transdoni al alia.

Oni nun preskaŭ same parolas pri malapero de lingvoj, kiel pri malapero de specioj. Same kiel fakulo pri besta aŭ planta grupo, lingvisto sentas sin devigata protekti sian minacatan studobjekton. Antaŭ kelkaj jaroj sciencistoj rimarkigis, ke en la mondopartoj aparte riĉaj je biologia diverseco, pro la abundaj ekologiaj niĉoj, ekzistas ankaŭ multaj lingvoj – unue ĉar etaj homaj grupoj povas memstare vivi en tiuj lokoj, kie nutraĵoj tre multas. Oni ofte citas la ekzemplon de Nov-Gvineo, kiel en la tre bona libro *Vanishing Voices* de Daniel Nettle kaj Suzanne Romaine. Malpli ofte oni verkas pri la nemalmultaj lingvoj eŭropaj, kiuj troviĝas rande de malapero. Interesa ekzemplo estas tiu de la francprovenca, indiĝena lingvo tie ĉi en *Lausanne*, kvankam nun tre malofte uzata de la urbanoj, eĉ se pluraj homoj sidantaj en la salono foje uzas ĝin. Tiu latinida lingvo kreiĝis en la nun sufiĉe forgesita burgunda regno, kiu ekzistis en vasta rodana-ĵurasa-alpa regiono ekde la kvina ĝis la

dekunua jarcentoj, foje memstare, foje sub la franka regado, tamen ĉiam kun forta nivelo da memkonscio. Kvankam la fruaj tekstoj maloftas – kaj tio validas por preskaŭ ĉiuj tiutempaj eŭropaj lingvoj – oni rajtas konjekti, ke la francprovenca estis relative unueca en tiu epoko. Sed, ekde la morto de Rodolfo la tria en 1032, la burgunda regno dispeciĝis en pli kaj pli multaj feŭdoj, kiuj neniam poste grandskale rekuniĝis. La lingvo perdis sian medion, aŭ pli ĝuste devis disiĝi por adaptiĝi al tre multaj etaj medioj, fragmentoj, kiuj neniel respondas al la petoj de la “moderna” vivo. Nun grupo da homoj provas konsciigi la loĝantojn de tiu areo pri tiu interesa heredaĵo, proponante interalie komunan skribmanieron por ĉiuj dialektoj de la lingvo. Sed tia tasko malfacilas: la komuna sento malfacile, nur iompostome rekreiĝas, ĉar antaŭlonge aliaj identecoj aperis, eĉ favorate de ŝtatoj, kiuj uzas la francan kaj la italan. Konklude la francprovenca fariĝis senniĉa, kaj por relanĉi ĝin oni do bezonus rekrei sian portantan socion, retrovi por ĝi medion. Tio ĉi cetere montras, ke postuli nur “kulturajn” rajtojn ne sufiĉas: savi lingvon signifas ankaŭ savi socion, popolon, etnon, do batali ankaŭ sur la politika kampo. La samon oni povas diri pri minacataj specioj, kies ekologian niĉon oni devas plejofte protekti aŭ eĉ rekonstrui.

Dum specioj kaj lingvoj malaperas, aliaj male tendencas iĝi invademaj, prenante la lokon de la aliaj. Oni povas facile rimarki, ke entute la diverseco malpliiĝas. Ekologiaj modeligoj montras, ke en iuj lokoj ekzemple baldaŭ restos nur tri mamuloj: la rato, la vulpo kaj la homo (krom kelkaj hejmaj bestoj). Same en iuj vastaj (sub)-

kontinentoj restos post kelkaj jardekoj eble nur la angla, la rusa kaj la ĉina. Jen, denove, tre simila situacio en ambaŭ kampoj.

Ano de specio estas individuo, vivulo. Sed kio estas ano de lingvo? Ĉu “lingva parto” de homa individuo? Aŭ pli ĝuste parto de lingva parto de individuo? Ĉar, ekzemple en tiu ĉi salono, kie ŝajne ĉiu komprenas min, ni ĉiuj estas almenaŭ dulingvaj. Kaj lingvojn oni “posedas” ĝis iu grado. Dum aparteno al specio estas plejofte tuta – ekster la fenomeno de hibrideco kaj de la tamen gravaj problemoj, kiuj ekzistas ĉirkaŭ la difino mem de la specio – aparteno al lingvo estas pli relativa. Sed ankaŭ tion iuj dezirus nei. Multaj, eĉ se ne plenkonscie, opinias, ke profunde ĉiu homo apartenas – apartenu – al unusola lingva komunumo, tio estas, ke li/ŝi vere konas aŭ iel devas koni, “havi” nur unu lingvon, preferinde sian nacian. Tia sinteno ekzistas ĉefe de la deknaŭa jarcento, epoko de la triumfo de la nacioj (aŭ almenaŭ de tiuj, kiuj sukcesis havi ŝtaton). La fama tiuepoka franca historiisto *Michelet* skribis: “La franca historio komenciĝas kun la franca lingvo; la lingvo estas la signo de nacieco”. Fine de la unua mondmilito la usona prezidento *Roosevelt* diris, ke “en Usono estas loko nur por la angla” kaj nuntempe la movado *US English* ŝajne agas en tiu direkto, eĉ se ĝi batalas “nur” por la oficialigo de la angla en Usono. Sed tio montras ankaŭ, ke por naciistoj lingvo devas havi difinitan medion – tiun de la naciŝtato.

Oni povas profiti la okazon por fari nemalgravan demandon: kiu estas la medio de esperanto? Ĉu tiu de la tuta homaro? Iuj ŝatus, sed estas verŝajne tro postuli. Eble *Zamenhof* dekomence pli bone perceptis tiun medion, kiun li

poste difinis per la “interna ideo”. Tiu ĉi, male al tio, kion oni povas legi ankoraŭ nun, ne estas reduktebla al iaspeca “ni-sento”. Ĝi rilatas al ne nur internacieco, sed ankaŭ al filozofia sinteno, kiu verŝajne pintas en iuj movadoj politikaj kiel la sennaciistoj aŭ religiaj kiel la oomotanoj kaj baha’anoj, medioj, kiujn oni devus eble pli profunde esplori.

Nun revene al la paraleligo inter lingvo kaj specio: ĉu oni ne povas trovi similecon inter lingvo, parolo (konsiderataj laŭ la fama *de Saussure*-koncepto) kaj socia medio unuflanke, kaj genotipo, fenotipo kaj ekologia niĉo aliflanke? La lingvo/genotipo konsistigas la bazan, malmolan kernon; parolo/fenotipo troviĝas meze, produktitaj de la interagoj de tiuj kernaj strukturoj kun la medio, biologia/natura aŭ socia.

Konklude oni plej verŝajne rajtas paroli pri ekologio de lingvoj, iel same kiel oni parolas pri ekologio de specioj. Aldone oni ne forgesu, ke ĉiu specio difiniĝas per genetika apartaĵo, kiu en si mem estas iaspeca lingvo. Tiun kondon ĉiu individuo posedas en persona, idiosinkrazia formo, same kiel homo posedas lingvon. Kompreneble la genetikon kodon oni akiras kiel rezulton de reproduktado, la lingvan almenaŭ parte per lernado, kaj ambaŭ estas submetitaj al la efikoj de la medio.

—oOo—

### **Tutmonda Festivalo de la Tero**

En 2007, tiu festivalo okazos de la 18a ĝis la 24a de junio en diversaj lokoj de la mondo kun la temo “La solidarecoj”. Iniciatoj estas ĝis nun anoncitaj en pli ol tridek landoj de la 5 kontinentoj. En 2006 estis nur dudekkvin landoj, kaj 200 asocioj. (En Francio estis 315 eventoj en 30 departementoj, 15 grandaj urboj kaj multaj vilaĝoj kun ĝenerale juna publiko).

JOHANN WOLFGANG  
VON GOETHE

ELEKTITAJ POEMOJ  
KAJ MAKSIMOJ



*Ĵus aperis “Elektitaj poemoj kaj maksimoj” de Johann Wolfgang von Goethe. Elektro, traduko kaj eldono de Willy Nüesch, Berno 2007.*

La juna Goethe estis interalie influita de la pensulo Johann Gottfried Herder, kiu reagis kritike al la verkistoj de la racionalisma periodo. Same kiel Jean-Jacques Rousseau li postulis “reiron al la naturo”, tio signifas kreadon elkoran, el la travivaĵoj, el la “la tempesto de la pasioj” (“Sturm und Drang”, periodo de la germana literaturo inter la epoko de la racionalismo kaj tiu de la klasiko). La juna Goethe admiris kiel modelon William Shakespeare: “Naturo! Naturo! Nenio tia, kia la naturo de la homoj ĉe Shakespeare.”

La amkanto *Bonveno kaj adiaŭo*: “Mia koro batis, rapide surĉevaliĝi...” estas ekzemplo pri ĉi tiu junaĝa stilo (sed ne troviĝas inter la elektitaj tradukoj). Malpacienco estas la natura impulso de la juna homo emanta brakumi la vivplenon kaj kuniĝi kun la amatino.

Tamen la adiaŭo post feliĉa kunesto doloras.

La sekva poemo ankoraŭ respegulas la admiron de la naturo kaj la senton vivi en ŝia sino.

### Sur la lago

*Per nova sango, freŝa pur’  
la mondo nutras min ;  
ho, ĉarmas, bonas la natur’  
tenanta min ĉe l’ sin’ !  
Nian boaton lulas ond’  
en rema taktmezur’,  
nubeca monta horizont’  
aperas dum vetur’.*

*Kial vi, okul’ vin fermas ?  
Ora rev’ !, ĉu vi reĝermas ?  
For, vi rev’ ! eĉ ora jam ;  
ankaŭ ĉi ’stas viv’ kaj am’:*

*Sur la ond’ briletas  
mil ŝvebantaj steloj,  
en nebul’ kvietas  
foraj montaj beloj ;  
matenvent’ sin lulas  
en la golfobskur’  
sin en lag’ spegulas  
frukto ĝis matur’.*

*(1775, Vojaĝo en Svislandon)*

Sekvis periodo malpli entuziasma kun deziro je retiriĝo kaj pripensado. Goethe skribante leteron al la grafino Stolberg :

*Ĉion donas la dioj senfinaj  
al karuloj siaj plene,  
ĉiujn ĝojojn senfinajn,  
ĉiujn dolorojn senfinajn, plene.*

De la liriko pri pasiaj travivaĵoj Goethe transiris en sia maturaĝo al pli pensema kaj etika sinteno kiel montras la suba ekzemplo. La sencon de la homa ekzistado li vidas en la plejeble

granda plenumo de morala vivo. Lessing kaj Herder esprimis samajn pensojn kaj Kantio evoluigis tutan filozofian sistemon tiurilatan.

## L'o dia

(La dieca)

*Nobla estu la homo,  
helpema kaj bona !  
Ĉar sole tio  
distingas lin  
de ĉiuj estaĵoj,  
kiujn ni konas.*

*Vivu la nekonataj  
antaŭsentataj  
superaj estaĵoj !  
Ilin simulu la homo ;  
lia ekzemplo instruu nin,  
kredi je ili.*

*Ĉar la naturo  
estas sensenta :  
lumas la suno  
al bonaj, malbonaj,  
kaj al krimulo  
kiel al la plej bona  
brilas luno kaj steloj.*

*Vento, riveroj,  
tondro kaj hajlo  
muĝas en sia vojo  
kaj ekkaptas,  
preterpasante  
unun post la alia.*

*En la amason  
palpiras feliĉo,  
kaptas jen knabon  
buklan, senkulpan,  
kaj jen la kalvan  
kulphavan kapon.*

*Laŭ bronzaĵ, eternaj  
grandaj leĝoj  
devas ni ĉiuj  
plenumi rondirojn  
de nia ekzisto.*

*Nur sole la homo  
kapablas neblon :  
li distingas,  
elektas kaj juĝas ;  
kaj la momenton  
li dotas per daŭro.*

*Sole li rajtas  
rekompenci bonulon,  
kaj puni malbonan,  
sanigi kaj savi,  
ĉion erare vagantan  
kunligi utile.*

*Kaj ni veneras  
la senmortulojn,  
kiel se ili homus,  
kaj farus pogrande,  
kion la plejbonulo  
faras nur podetale.*

*La nobla homo  
estu helpema kaj bona !  
Senlace li kreu  
utilon kaj juston,  
estu al ni modelo de tiuj  
antaŭsentataj estaĵoj !*

(1775/1786, Vajmaro)

# Indekso enhava de *SES informas* Jaro 2005

## Enkondukaj vortoj:

Por favori retrovon de artikoloj kaj de informoj aperintaj en nia organo jen ni publikigas indekson de la pasinta jaro.

La redaktoro: Claude Gacond

### Mallongigoj:

e-a = esperanta

e-ista = esperantista

e-isto = esperantisto

e-o = esperanto

i-a = internacia

n = numero

p = paĝo

ps = pseŭdonomo de

vd = vidu

*Titolo de libro aŭ periodaĵo*

### A

*Abrégé grammatical et pratique de la langue internationale e-o* : n5p25.

Aebi Traugott Rinaldo : n3p14.

*Alia Venecio* : n5p24.

Allemand Luc aŭ Luko : n1p5, 8, 28-29, n2p4, n3p16-17, n5p28.

Allotte de la Fuÿe : n3p26.

Allsprachendienst E-o, E-o-Librejo Zuriko : n5p27.

Altherr-Perič, Anita : n3p6, 20, n4p3, 17.

Andreae-Lätt Christiane : n1p10, n5p7.

*Antropozofia Kristologio* : n2 p26.

Asnes A. : n4p21-23.

Auld : n3p28, n4p30, n5p25.

### B

Babeuf : n2p23.

Bachmann Loise : n3p14.

Badoux Françoise : n1p10.

*Balenoj, delfenoj kaj aliaj mirindaĵoj...* : n5p24.

Barkovič Krešimir : n5p26.

Baudouin de Courtenay Jan : n4p22.

Baur Arthur : n3p5, n4p27.

Baur-Sallenbach Heidi : n3p5, n4p27.

Bazilio Joe : n3p32.

Bélisle-Grosjean Marion : n4p19-20, 28.

Bélisle Romain & Samuel : n4p19.

Bérout-Focke Nicole : n1p24-25.

Béatrix-Koleva Sonia : n1p10.

Beyeler Kim : n1p28.

Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds : n1p4, 9, n3p6-14., n5p24.

Bieri S. : n3p14.

Blanc Maillard Charlotte : n1p10, n4p8.

Blanc Claude : n1p10, n3p7.

Blanchet Pierrette : n3p14, n5p7.

Blanke Detlev : n4p12-13, n5p24-25.

Blanke Wera : n4p13.

Body Marie-Christine : n5p24.

Bolton John : n2p23.

Borel Jean & Jules : n4p12.

Bormann Werner : n4p13.

Boulton Marjorie : n5p24.

Bourlet Carlo : n4p26.

Bratschi Bertrand : n5p8.

Brecht Bertold : n2p26.

Brügger Franz : n4p27-28.

Brügger Margrit : n4p28.

Brun Sonja : n1p25-26, n2p16, n3p23, n4p18, n5p11.

*Bulletin de la Société Jules Verne* : n3p27.

Burgbacher Laurent : n1p28-29, n3p5, 23.

Bush (prezidanto) : n2p25.

### C

Camacho Jorge : n3p28.

Carlevaro Tazio & Teresita : n1p10, n3p14.

Carol Luiza : n2p27-28, n5p25-26.

Cart Théophile : n3p28-29, n4p26.

CDELI = Centre de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo I-a : n1p3-5, 8-9, 11, 22-23, n2p1, 3, 12-13, n3p1, 6-14, 21-22, n4p3, 9, 16, 28-29, n5p24.

Charrière P. M. : n1p10.

Chaussot Isabelle : n3p31.

Chaves Gabrielle : 5p7.

Chaves-Walder Verena : n1p26-27, n2p17, n3p24, n4p20, 5p7-8, 11.

Cherpillod André : n1p11, 23, n2p7, n5p24-25.

Chibleur E. : n3p27.

Chmielik Tomasz : n1p5, 7, n2p4, 11, n5p24.

Chrdle Petro : n4p14.

*Chronique huronne* : n4p29.

Civito : n3p19.

Comptoir Suisse : n3p3, 14, n4p1, 4-9, n5p7.

*Conversational E-o* : n5p24.

Corsetti Renato : n3p15, 19, n4p10, 13, n5p1, 3-6, 24.

Czajkowski Witold : n2p20.

### Ĉ

Ĉižikaitė Aida : n4p14.

Ĉolić Senad : n3p30.

### D

Dahan Lucien : n1p10.

*La Danĝera Lingvo* : n4p12.

Darbellay Christian : n4p14.

De Beaufront Louis : n2p12, n4p25-26.

De Diego de la Rosa Fernando : n3p27.

De Diego Fernando : n3p27-29.

Dek Liven : n3p28.

*Deklaracio de Homarano* : n1p11.

De Mestral Dominique & Elisabeth : n2p3, n4p3, 17-18, n5p6.

Delfour Jaseph : n3p26.

De Saint-Yves Héraklès ps vd André Sandoz.

Dettling Annelies : n1p25, n5p11.

*Dia Regno* : n4p15.

Di Vetta Arlette : n3p6, n4p7.  
*Le discours sur les langues sous les régimes autoritaires* : n5p24.  
Döring Erna : n3p14.  
Dambrauskas aŭ Dombrovskij A.A. : n4p22-24.  
De Sassi Maŭro : n5p9.  
*Don Karlos* : n4p32, n5p24.  
*Donkiĥoto* : n3p27, 29.  
Dorthe Pierre : n3p14.  
Dovat Jacques : n3p5, n4p28.  
Dovat-Clément Lucienne : n3p5, n4p28, 5p7.  
Dreyfus : n4p25.  
Drezen E.K. : n4p26.  
Ducret Richard : n3p14.

## E

Eco Umberto : n5p11.  
Eisenegger Elisabeth: n1p10.  
*Elektitaj poemoj kaj aforismoj* : n5p24.  
Elmiger Daniel : n3p14.  
Elsner-Bürki Verena : n3p14.  
Emmerich Andreas : n4p12.  
Enderby : n3p19.  
ERACOM (lernejo) : n2p9.  
Ernst Rolf : n1p2, n2p19, n3p2, n4p2.  
*Der Esperantist* : n5p24.  
*La E-isto* : n2p12.  
*E-o express* : n5p24.  
**E-o organizaĵoj lokaj:**  
**Basel** : ESB = E-o-Societo Basel : n1p3, 24-25, n2p3, 14, n3p3, 22, n4p3, 17, n5p10.  
**Bern** : E-o-Societo Bern : n1p25, n2p14, n4p29.  
**Genève**: E-o-Grupo La Stelo : n1p25, 2p3, 15, n3p5, 23, n4p3, 17, n5p10.  
**Kantono de Neuchâtel**: n1p26, n2p16, n4p18.  
**Lausanne**: LES = Laŭzana E-o-Societo : n1p25, n2p3, 9, 15, n3p3, 5, 23, n4p3, 18, n5p10.  
**Luzern**: LES = Lucerna E-o-Societo : n1p3, 25-26, n2p3, 16, n3p3, 23, n4p3, 18, 27-28, n5p10.  
**Wil**: E-o-Klubo Wil : n1p3, 26-27, n2p3, 17, n3p3, 24, n4p3, 20, n5-9, 11.  
**Zürich**: ESZ = E-o-Societo Zürich =: n2p7, 17, n3p3, 15, 24, n4p3, 10, 20, n5p3, 8, 12.  
E-o Perkoresponde : n1p9.  
*Etnismo* : n4p6.  
Eŭropa E-o-Unio : n3p18.  
Eŭropa Komisiono : n3p21.  
Eŭropa Konsilio : n3p7.  
EU = Eŭropa Unio : n2p25, n5p24.  
*L'extraordinaire diversité des langues et sa répercussion sur l'e-o* : n5p25.

## F

Favre Alain: n2p7, n3p6.  
Favre Jacqueline : n2p10.  
*Fenomeno Svislando*: n4p27.  
Fernández Miguel : n3 p28.  
Fiaux Monique : n3p14.  
Fischer Myrta : n3p5.  
Fischer Olivia : n1p27, n2p17, n5p11.  
Fischer-Schmitter Wolfram : n1p26-27, n2p17, n3p5, 24, n4p20, n5p11.

Fonds Edmond Privat : n4p29.  
Fontannaz Nancy : n1p2, 4, 23, n2p10,12-13, n3p2, 5, 14, n4p2, 7-8, 16, n5p6.  
*Fonto* : n3p29.  
Fornal Jerzy : n5p26.  
Frank Christoph & Ines : n5p11.  
Frauchiger Benno : n1p28-29, n3p5, 32.  
Friedly Georgette : n3p14.

## G

Gacond Andrée : n2p1, n3p6, n4p31, n5p7.  
Gacond Claude : n1p2, 5-7, 9, 11, 23-24, n2p1-7, 9-15, n3p2, 6-9, 12, n4p2, 16, 27-29, 31, n5p2, 9.  
Gambarini Raphaël : n3p12.  
Gastejo Edmond Privat : n4p29.  
*Gerda malaperis* (filmo) : n3p15, 23, 32, n4p10, n5p3.  
GEA = Germana E-o-Asocio : n4p11-14.  
*George Sand und der deutsche Emanzipationsroman*.  
Gimes Miklos : n5p23.  
Giusta Giuseppe : n1p5, n2p4, n3p1, 9.  
Glättli Ernst : n3p14.  
Gorecka Halina : n4p14.  
Graf Bruno : n1p2, 3, 10, 24, 26, n2p2-3, 6-7, 17, n3p2, 4-7, 12, 19, n4p2, n5p6.  
La Grande Ourse, lernejo : n1p4, 10, n2p4, n3p5, 7-8.  
Grattapaglia : n4p14.  
*La graveco de la fidelejo* : n5p25.  
Grin François : n3p18, 31.  
Grosjean Ivon : n3p5, n4p28.  
Grosjean Joëlle : n4 p28.  
Grosjean-Robert Mireille : n1p2, 5, n2p2, 4-6, 13, n3p2-7, 9-11, 19, n4p2, 5-6, 8, 19-20, 28, n5p2, 7.  
Grossmann André : n1p25.  
Grossmann Hans-Werner : n1p2-3, 10, n2p2-3, 9-10, n3p2, 7, 14, n4p2, n5p2, 4, 6, 8.  
Guegen Raymond : n5p25.  
Guevara Che : n2p22.  
Guldin Margrit : n3p5, n4p29.

## H

Hachette (eldonejo): n5p19.  
Haenni Ueli : n1p25, n2p14.  
Haupenthal Reinhard : n5p25.  
Henry César : n1p8.  
*Heroldo de E-o* : n1p23, n2p13, n3p22, n4p16.  
Herr Renate : n3p14.  
Hillel (la saĝulo) : n1p11-22, n2p7, n4p23-24, n5p10.  
*Hodler en Mostar* : n5p10.  
Hofmann Gert : n4p14.  
Homaranismo : n1 p11-22, n4p21-26, n5p10, 13-20.  
Huguenin Noël : n3p14, n5p7.  
Humair Jacques-André : n1p5, n2p4, n3p8, 11-12.

## Ĥ

Ĥruščov : n5p22.

## I

Ido : n3p12, n4p24-25.  
ILEI : I-a Ligo de E-istaj E-istoj : n1 p11, n2p6, n3p6-7, 20-21, n4p16.  
*L'Impartial* : n3p22.  
Interlingua : n3p12.  
*Interlinguistische Beiträge* : n5p25.



## J

Jaccard-Besson Marguerite : n3p14.  
Javal Emile : n4p25-26, n5p13-14.  
Jayet Marguerite : n3p14.  
Jerman Vida : n5p26.  
Jesuo Kristo : n4p23-24.  
Johannot Anne-Marie : n1p10.  
Johano Paŭlo la dua : n5p25.  
JES = Junularo E-ista Svislanda : n1p3, 28-29, n3p16-17.

## K

Kabe: n2p12.  
Kádár János : n5p23.  
Kästli Hans : n5p7, 9.  
Kaiser Cezard : n2p26.  
Kalocsay : n3p28.  
Kapista Tereza : n3p31, n5p26.  
Kappeler Beat : n3p31.  
Kataluna E-o-Asocio : n3p30.  
Keller Stefano: n1p23, n2p1, 13, n3p1-2, 4, 7-11, 14, n4p1-2, 4, 6, 8, 9, n5p1-2.  
*Kiel mi trovas la Kriston* : n2p26.  
*Kio povus esti Eŭropo* (filmo) : n3p18.  
Kobiela Martina : n1p28-29.  
Koller Alois : n5p7-8.  
Korobejnikov Andrej : n3p18.  
Korody Zsofia : n3p21.  
KELI = Kristana E-ista Ligo I-a : n4p15, n5p8.  
Künzli Andreas aŭ Andy : n1p1-2, 4-5, 8-9, 11-23, 25, n2p3-4, 15, n3p2, 10-13, 15, 19, n4p2, 9-11, 15, 21, n5p5.  
KCE = Kultura Centro E-ista : n1p23, n2p6, 13, n3p6-7, 22, n4p15, 29, n5p27.  
*La Kvina Evangelio* : n2p26.

## L

*Lastan jaron en Marienbad* (filmo) : n4p15.  
Lavanchy Jean-Jacques : n1p10, n5p7.  
Lavangetto Giampaolo : n3p20.  
Lepape Racine Christine : n3p32.  
Leresche Jean-Marc: n2p18, n4p20.  
Libra Foiro (Genève) : n3p5.  
Libroservo de CDELI : n5p27.  
Lins Ulrich : n4p12.  
Lord Don : n5p24.  
Luginbühl Annina : n1p28.  
Lula (prezidanto) : n2p25.  
Lumumba Patrice: n2-21.

## M

Madella Luigia : n3p21.  
Maléter Pál : n5p23.  
Mallepell Verena : n5p7.  
Mamin Jeanne : n3p14.  
Marchon Gabriel : n5p7.  
Margot Nicole : n1p2, 2p2, 6-7, n4p1, 5-8, n5p5-6.  
Martin Charles-Noël : n3p26.  
Masson Henri : n3p30.  
Matvejević Predrag : n5p24.  
Mayer Hans-Peter : n4p14.  
Mayer Herbert : n4p14.  
Meier Hans : n5p7.

Menzi Peter : n3p14.  
Messeiller SA (presejo) : n1p1, n3p12.  
Mevo Mad : ps vd Stakian Madeleine.  
Meyer Conrad Ferdinand : n2p26.  
Mickle Gary : n5p26.  
Moch Gaston : n4p26.  
Molnar Monika: n1p23, n2p6, 12-13, n3p7, n4p16.  
*Monato*: n3p24.  
Moon : n4p14.  
Morgenstern Christian : n3p29.  
Mozeo : n4p24.  
Münger Marie-Louise : n1p6-7, n2p10-11.  
Muster Eduard : n1p10, n3p14.

## N

Nagy Imre : n5p23.  
Naumann Aleksandro : n4p26.  
Nekredebła Verdkata Socio : n2p10.  
*Neues Deutschland* : n2 p26.  
Neves Gonçalo : n3p27-28.  
Nicolet Claire & Bernard : m3p14.  
Noser Madeleine : n5p7.  
Nüesch Didier : n5p7.  
Nüesch Willy : n2p26, n3p29, n4p32, n5p24.

## O

Occidental-Interlingue : n3p12.  
*La Ondo de E-o*: n5p26.

## P

Paccaud Marc : n1p10.  
Panchaud André : n3p25.  
Parma E-o-Asocio : n3p21.  
Parzival : n1p10, n5p7.  
Pereira Karen : n3p32.  
Perič-Alther Anita : n3p6.  
Perret-Gacond Chantal & François-Alain : n2p10.  
Petitpierre Max : n4p29.  
Petrovic Radojica : n3p15.  
Piron Claude : n2p6, n3p5, 7, 15, 23, 28, n4p3, 10, 17-18, n5p3, 7, 27.  
*PIV = Plena Ilustrita Vortaro 2005*: n5p27.  
Pochanke Ciara : n5p11.  
Pochanke-Grzywa Barbara : n1p27, n3p5, n5p9, 11.  
Pochanke Dawid : n5p9, 11.  
Pochanke Leonardo, Lucyna, Nicole, Raffael & Veronika : n5p11.  
Pochanke Robert : n5p9, 11.  
Pochanke Stanislaw : n1p26-27, n3p5, 5-9, 11.  
Pochanke Vera : n5p9.  
Pola E-o-Asocio : n5p9.  
*Pri la kristana amo : encikliko* : n5p25.  
Privat Edmond : n1p7, n2p11, n4p29.  
Privat Yvonne : n4p29.

## R

Radio Pilatus : n4p28.  
Radio Sarajevo : n3p30.  
Radio Sunshine : n4p28.  
Randin François : n1p24, n3p5, n4p18.  
RERO (Romanda biblioteka reto) : n5p24.  
Rey Anna & Koni : n1p3, 25-26, n2p3, 16, n3p3, 23-24, n4p3, 18, n5p10.  
Riaim Sean O. : n3p18.

Rice Condolezza : n2p25.  
 Rinaldo Traugott : n5p7.  
 Rivière Jimmy : n3p14.  
*La roma triptiko*: n5p25.  
 Rooke Dieter : n2p9, n3p7, n5p4.  
 Rorbach Marc : n4p28.  
 Roux Jacques : n2 p23.  
 Ruchti Daniel : n1p25, n2p14.  
*Ruslanda E-isto* : n4p21-22, 26.

**S**

La Sagne (semajnfino) : n1p3, 6, n2p3, 5, 1-11.  
 Saint-Juste : n2p23.  
 Sandoz André : n4p29.  
 Sandoz-Giroud André : n1p10, n2p10, n3p6, n4p15.  
 Schiller Friedrich : n4p32, n5p24.  
 Schneebeli Rudolph : n3p5.  
 Schneller Martine : n1p4, n2p12, n4p16.  
 Schneller Richard : n1p2, n2p21, 27, n3p2, 25, 27, 31, n4p2, 30, 32, n5p21-22.  
 Scherer Margrit: n5p11.  
 Scherer Paul : n1p25-26, n2p15, n3p23, n4p18, 27, n5p7, 11.  
 Schleyer : n3p26.  
 Schubert (*Vintra Vojaĝo*) : n1p5, n2p5, n3p1, 9.  
 Sebert Hippolyte : n4p26, n5p13, 19.  
 Senn Hans-Peter : n1p3, 24, n2p3, 14, n3p3, 22, n4p3, 17, n5p10.  
 SAT = Sennacieca Asocio Tutmonda : n3p30-31, n5p26.  
*Sennaciulo* : n3p30.  
*La Sentinelle* : n4p29.  
 Seriot Patrick : n5p24.  
*SES informas* : n3p14.  
 Sieger J.U. : n5p11.  
 Siegrist Beat : n5p11.  
 Siegrist Lilian : n5p11.  
 Sixtus Pot Christiane : n2p9-10, n3p14.  
 Skorupski Jan S. : n2p3, 20.  
 Spagnolini Piero : n3p20.  
 Spalinger Berthe : n1p3, 24, n2p3, 10, 14, n5p10.  
 Stakian Armène : n3p9.  
 Stakian-Vuille Madeleine : n1p5, n2p5, n3p1, 9-10.  
 Stalino : n5p22.  
 Steiner Rudolf : n2p26.  
 Svisa Akcidenta Asekurejo SUVA : n3p23.  
*Svisa Antologio* : n4p27.  
 SAEF = Svisa Asocio de E-o-Fervojoj : n4 p28.  
*Svisa Enciklopedio Planlingva: Universalaj lingvoj en Svislando* : n1p1, 4, 8-10, n3p6, 10-13, 18, n4p9, 14, 24, 32, n5p5, 9, 12.  
 Svisa Radio I-a : n4p27, 32.  
*Sud-Rejna Kuriero* : n1p25.  
 SES = Svisa E-o-Societo : n1p3-11, n2p3-9, n3p3-7, 19, 21, n4p3-10, 12, 16, n5p3-8.  
 Svisa ILEI-Sekcio : n2p13.  
 Szilágyi József : n5p23.

**Ŝ**

Ŝtimec Spomenka : n5p10.

**T**

Tassencourt Charles : n3p26.  
 Tellier Angela : n3p18.  
 Testaz Lisette : n1p10.  
 Tisljar Zlatko : n3p18, n4p13.  
 Toltoj Lev Nikoalevič : n4p22.  
 Tonkin : n3p19.  
*Trait d'Union* : n3p27.

Triesta E-o-Asocio : n3p20.

Triolle Renée : n5p25.

**U**

Ungar : n3p28.

UEA = Universala E-o-Asocio : n1p11, n2p3, 15, n3p6, 19, 21, 28, n4p10, 13, 16, n5p3, 6, 13-19.

UK = Universala Kongreso de E-o : n1 p3, 24, n3p18-20, 23, 26, n4p3, 7, 18, 20-21, 26, 28, n5p11.

UN = Unuiĝintaj Nacioj : n2p21-24.

Usono : n2p25.

**V**

Varsovia Pakto : n5p23.

Verne Jules : n3p25-27.

Verne Michel : n3p26.

Vevey, Fotila Muzeo: n4p3, 18.

Vigny Marc : n3p14.

Viredaz Marguerite : n3p14, n5p7.

Vogel Helmut: n2p20.

Volapük : n3p12.

Von Büren Jean-Thierry : n1p5, n2p5, n3p1, 5, 7-9, 19.

**W**

Waldenberg A : n4p22.

Walder-Guggenbühl Elsbeth : n5p8-9.

Walder Monika, Otto & Ruth : n5p8.

Warhol Andy : n3p20.

Waringhien Gaston : n3p28.

Weidmann Armin : n3p5.

Weidmann Dietrich : n1p2, 2p2, 5, 7, n3p2, 6-7, 24, n4p2, 31, n5p1-2, 4, 6.

Weidmann Jasmin & Linda : n5p1, 5, 12.

Weidmann Nelly : n5p1, 6, 12.

Weiss André & Colette : n5p26.

Wilde Oscar : n5p25.

West Mike : n5p12.

Westermayer Manfred : n2p7.

Wettstein Henri : n2p10, n3p14, n5p8.

Wulff Christian : n4p14.

**Z**

Zamenhof Aleksander : n4p22.

Zamenhof L.L. : n1p11-22, n3p25, 28, n4p19-26, n5p13-20.

Zaslavsky Véra : n5p8.

Ziegler Jean: n2p21-26.

# Redakciaj informoj

Iom post iom mi trovas kunlaborantojn, kiuj pretas transpreni redaktan taskon.

La kunlaboro de Richard Schneller koncerne al la redaktado de *kulturaj paĝoj* komencita en 2004 estas ege kontentiga.

Kaj Stefano Keller, la nova sekretario de la SES-estraro, ĵus akceptis prizorgi la parton de nia bulteno dediĉita al la *Vivo de SES*.

Jaron post jaro montriĝas, ke akurata publikigo de la kvina kajero de nia bulteno estas malfacilega tasko. Tial ni eksperimentos la jaran eldonon de kvar kajeroj trimonataj. Oni konsciu, ke la pretigo, aperigo kaj dissendado de unu sola numero de *SES informas* kaŭzas al la redaktoro almenaŭ dek tagojn de plena laboro. Tial gravas, ke nia bulteno ne dependu nur de unu sola laboremulo, sed de redaktora teamo, se ni volas eviti eldonan krizon.

Nun mi serĉas redaktoran kunlaboranton, kiu pretos transpreni la bultenan parton dediĉitan al la **esperanta vivo grupa kaj tutsvisa**. Jen la kompetento, kiu karakterizu tiun kunlaboranton: reala interesiĝo pri la aktiveco de la lokaj grupoj kaj de la tutsvisaj organizaĵoj, kaj ankaŭ altnivela regado de esperanto mem. Espereble iu sin sentos kapabla por sin proponi por transpreni

la redaktan taskon priskribi la aktivecojn de niaj esperanto-rondoj.

Kaj tutcerte la kovrilaj paĝoj de nia bulteno bezonus la helpon de kapabulo, kiu alportus sian grafikistan talenton al la plibeligo de nia bulteno. Ankaŭ tiurilate mi serĉas regulan kunlaboranton.

Kaj mi dankas la teamon, kiu regule helpas min por la dissendo de nia bulteno. André Sandoz, Andrée Gacond kaj ofte Nancy Fontannaz prizorgas tiun helplaboron, gluante la etiketojn pretigitajn de nia kasisto Hans-Werner Grosmann kaj enkovertigante la bultenon, kiun la printejo nun liveras falditan kaj agrafitan, kio estas granda progreso tempoŝpara.

Al tiu fotokopia printejo ni liveras materialon je formato A4, kaj la bulteno mirakle aperas A5-formate. Tio estas granda progreso teknika, kompare al tio, kio ekzistis antaŭ unu jaro, kiam ni mem devis pretigi ĉiujn paĝojn je la formato A5, kaj poste mem faldi kaj agrafi la kajerojn.

Kaj pri ĉio tio certe devos diskuti la nun kreiĝanta redaktora teamo kun la estraro de SES cele al daŭra plibonigo de nia bulteno.

Dankon al ĉiuj kunlaborantoj kaj antaŭdankon al la kunlaborantoj.

Claude Gacond.



# Svisa kalendaro

## Aprile

- 11 : **Luzern** : Kunveno kun Sonja Brun.  
26 : **Basel** : Kunveno kun la temo : Agavoj.  
28 : **Genève** : Ĝenerala Kunveno de SES.

## Maje

- 1 : **Genève** : Kunveno.  
5 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI : seminario.  
7 : **Lausanne** : Kunveno.  
9 : **Luzern** : Konversacia rondo kun Scherer.  
25 : **Redakta datlimo de SES informas**  
25 : **Basel** : Renkonto ĉe Berthe Spalinger.  
6 : **Luzern** : LES : ĉe ges-roj Rey.

## Junie 2007

- 2 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI : seminario.  
5 : **Genève** : Kunveno.  
13 : **Luzern** : Kunveno kun A. Dettling.  
16 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI : Studsabato.  
24-25 : Enĉaleda semajnfino.  
28 : **Basel** : Grün.

## Julie

- 11 : **Luzern** : Konversacia rondo kun S. Brun.

- 12 : **Basel** : Krad-rostado ĉe H.-P. Senn.  
15 : **Redakta datlimo de SES informas**

## Aŭguste

- 4-8 : **Jokohamo** : **Universala Kongreso**.  
10 : **Luzern** : Ekskursa vespero.

## Septembre

- 1 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI : Seminario.  
Reinhard Hauptental prelegos pri la vivo,  
verkaro kaj agado de Johann Martin Schleyer.  
9 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI : Studsabato.  
12 : **Luzern** : Konversacia rondo kun Scherer.

## OktoBRE

- 6 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI : Seminario.  
10 : **Luzern** : Kunveno kun Margrit Scherer.  
15 : **Redakta datlimo de SES informas**

## Novembre

- 3 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI : Seminario.  
17 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI : Studsabato.

-oOo

anonco

## Kabanretpaĝo de Svisa Alpa-Klubo en Esperanto

Migrante ĝui la montaran ĉirkaŭaĵon, travivi la naturon je alteco de 2'500 metroj super la marnivelo. Tio eblas por familioj, grupoj aŭ unuopuloj ĉe la Albert-HEIM-Kabano de la Svisa Alpa Klubo. – Krom tio montgrimpi, skiadi por komencantoj kaj spertuloj. Trovu informojn kaj ĉion sciindan esperante ĉe [www.albert-heim-huette-sac.ch](http://www.albert-heim-huette-sac.ch)